Oct. 1913. 4e Jaargang No. 10 (46)

Nederlanda Katoliko

Maandblad, Officieel Orgaan van den Nederl. R.-Kath. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko", gevestigd te 's Hertogenbosch, opgericht 29 Augustus 1909, bisschoppelijk en koninklijk goedgekeurd.

Ĉion per amo, nenion per forto. *(S. Franc. de Sales).*

Hoofdredacteur:
J. N. J. Smulders, Arts te Udenhout.

Abonnementsprijs,
p.jaar, franco p. post, bij vooruitbetaling
Nederland (niet-leden). . . *f* 1.—
België . . Sm. 0,87 = - 1,06
Andere landen (aliaj landoj)
Sm. 1,04 = - 1,24
Afzonderlijke nummers 10 cent.

E S P E R A N T O

Redactie en Administratie:
H. Damen, St. Crispijnstr. 57,'sBosch.

Advertentieprijs,
per regel 10 cts.
Bij geregelde plaatsing aanzienlijke korting.
Voor inlichtingen wende men zich tot de administratie.

Parolado de la oficiala delegito de „Nederlanda Katoliko" dum la malferma Kunsido de „Nia Kvara" en Romo.

Estimataj Samideanoj.

Mi alportas al vi la korajn salutojn de la Nederlanda Katolika Ligo Esperantista „Nederlanda Katoliko". N.K. estas la Katolika nacia societo plej granda, ĝi havas preskaŭ mil bone organizitajn membrojn.

Feliĉa mi estas, alporti al vi la salutojn de mia malgranda patrujo Nederlando, kie antaŭ kelkaj tagoj okazis la kongreso por la paco kaj kie estis solene malfermita la pacpalaco en Hago, konstruita por esti la hejmo de la internacia arbitracio.

Tio memoras al mi, ke mi trovas min en la fama urbo, kie vivas kaj laboras la Anstataŭanto de nia Dia Savinto Jezu Kristo, kiu estas la vera „Reĝo de la paco". Jes, tie ĉi estas la centro de la Katolika kredo, la seĝo de la doktrina aŭtoritato, la gardejo de la Dia Vero kaj de la principoj, kies praktikado nur povas feliĉigi la homaron, de la principoj, kiuj estas ankaŭ la fundamento de la justeco, sen kiu la paco inter la popoloj devas resti ĥimero, kian ajn belan pacpalacon oni konstruu.

Ne estas bezone esprimi per vanaj vortoj, ke ni, Katolikaj Nederlandanoj, konvinkite nin submetas humile eĉ al la simplaj deziroj de la Sankta Seĝo; ni ja pruvis tion ĉiam per niaj faroj kaj agoj.

Kiam nu por *ĉiu* Katoliko, estas granda ĝojo iri al la bluaĉiela Italujo

kie floras la oranĝarboj, sed precipe iri al tiu Romo, kie loĝas la Anstataŭanto de nia Dia Savinto, se, mi diras, por ĉiu ajn Katoliko tio estas granda ĝojo — mi sentas malĝojon je la penso, ke la plej nobla Katolika samideano, nia kara Prezidinto de I.K.U.E., P-ro Richardson, ne povas en tiu ĉi momento ĝui kun ni tiun ĝojon. Li, kiu tiel pie kutimis paroli kaj korespondi pri la Sankta Seĝo kaj pri la „*Cathedra Petri*", li, kies lasta revo estis, al piedoj de la sankta Patro meti sian noblan koron kiel puran oferaĵon, li, jam sur vojo al la urbo de la Papoj, subite estis vokita de la ĉiela Patro al la dia Jeruzalemo .

Kia perdo por ni, orfoj sen tiu nobla kaj pia patro! Kia malĝojo por ni sen tiu fidela kaj aminda amiko kaj frato. . . Ho, kiom mi iam eraris, pensante, ke ja *mi* estis lia plej intima amiko! Sed ĉiuj, kiuj interrilatis kun li, same eraris: ĉar li estis samtempe por ĉiuj senescepte la plej intima amiko, la plej bona patro. Kia perdo por ni ĉiuj! Memoru nur: kiam inter ni minacis malkonkordo, tiam sufiĉis unu vorto de nia pacamanta prezidanto, kaj ĉiuj denove interkonsentis kaj interkonkordis. Kia perdo por nia internacia katolika movado. Li estis la animo de nia movado, al kiu ĉiuj sin turnis kiel la varmon kaj lumon soifantaj floroj sin turnas al la bonfaranta suno. Kaj jen la solvo de la enigmo, ke la Intern. Katolika Unuiĝo Esperantista, la I.K.U.E. povis ekzisti kaj vivi sen efektiva organizado. Li sola reprezentis la organizon de nia I.K.U.E. Li estis la centro, de kiu ĉio deiris, al kiu ĉio revenis. Ni ne riskis entrepreni ion, sen lia saĝa konsilo, sen lia prudenta aprobo.

Ni nun subite estas kvazaŭ ne organizitaj, kvazaŭ ne kunligitaj pecoj, ĉar li estis la sola ligilo, kiu nin dolĉe kunligis en unu tuto.

Kara patro nin forlasintal senlaca laboranto por nia kara afero, dankon, dankon por ĉio, kion vi por ni faris. Ni ĉiam memoros vin.

Ni konservos kiel grandvaloran heredaĵon, postlasitan al ni, la fratan amon, la interkonkordon, la fervorecon por nia kara afero; la sendiskutan submetiĝon al la Ekleziaj Aŭtoritatuloj, kiujn la Sankta Spirito oficdonis, por estri la Eklezion de Dio; ni konservos la piecon kaj purecon de nia movado. Kaj perdinte vin, la centron kaj animon de I.K.U.E. ni devas anstataŭi vin inde, kaj ĉar via persono kvazaŭ prezentis la organizon de I.K.U.E., ni havas nun la gravan devon organizi nian movadon, ĉar en malordo kuŝas ruino kaj pereo. Por vin honorigi en via I.K.U.E., ni nun devas penadi, por ke, baldaŭ organizita, I.K.U.E. povu daŭre vivi kaj evolucii. Jen ankaŭ la komision, kiun donis al mi „Nederlanda Katoliko".

Restas al mi danki la organizan komitaton kaj ĉiujn, kiuj laboris al la antaŭpreparo de Nia Kvara Kongreso, Denove mi salutas kaj bondeziras vin ĉiujn je la nomo de la Nederlanda Katolika Ligo Esperantista.

D-ro Smulders.

Nia Pilgrimo.

Mi unualoke priparolu *nian Aŭdiencon* ĉe la Sankta Patro Pio X, donita al ni, kiel kutime, en la „Damasa Korto" de la Vati-

Op de eerste plaats dan de audientie bij den H. Vader Pius X, ons, volgens gewoonte, gegeven op het St. Damasus Plein in het Vaticaan. Daar juichten

kano. Jen ni aklamis nian grandan Papon, la Ĉefon de la Sankta Eklezio kaj la Anstataŭanto de Jezu Kristo. Ni estis 80, starante meze de ĉirkaŭ 3000 pilgrimantoj. Tondraj aklamoj resonis, kaj la Sankta Patro ridetante aŭskultis la kriojn de amo kaj fidelo de siaj infanoj. Kiel ondegoj ĉiam denove suprenleviĝis la ĝojegaj krioj de la amaso, ne ĉesis la entuziasmaj aplaŭdoj, ĝis kiam la Sankta Patro donis signon kaj ĉiuj silente surgenuiĝis kaj ricevis la Apostolan Benon por si kaj por la siaj. Tuj poste *laŭ speciala permeso konsentita al ni Esperantistoj*, la Vatikana Orkestro eksonigis nian himnon „Ni volas Dion" kaj ni, kun duoble fortaj voĉoj kantis tiun himnon fiere kaj entuziasme, meze de 3000 diverslingvaj pilgrimantoj. Kia feliĉo en niaj koroj — forgesitaj estis la longa, laciga vojaĝo, la premanta varmego de Romo ... ĉio ajn ŝanĝiĝis en pura, sankta, vera ĝojeco, kies memoro heligos niajn plej malhelajn tagojn en la estonto. Finiĝis nia himno, silentis la orkestro, denove tondris la aklamoj de la amaso, kaj ... jen foriris tiu respekteginda Maljunulo je aspekto plej sana, je teniĝo plej imponanta, je vizaĝo elspiranta bonecon kaj sanktecon ... malaperis la blanka figuro de el niaj okuloj, sed gravurita en nia memoro je eterne!

Kaj ankaŭ ni foriris, malrapide, rakontante unu al alia sian feliĉon kaj ĝojon. Vidante S-ron Colas, mi preskaŭ ĉirkaŭbrakis lin: ĉu ne li sola aranĝis tion ĉion! Mi ne precize memoras, kiajn malsaĝaĵojn ni interbabilis pro entuziasmo, nur mi sciąs ankoraŭ, ke mi volis lin kanonigi tuj, ekkriante: Amiko Colas, vi efektive povas fari miraklojn!

Estas nedubeble, ke ni samtempe faris grandan propagandon

wij onzen grooten Paus toe, het hoofd der H. Kerk en den Plaatsvervanger van Jesus Christus. Wij waren een tachtigtal, staande te midden van ongeveer 3000 pelgrims. Donderende toejuichingen weerklonken, en de H. Vader luisterde glimlachend naar de kreten van liefde en trouw zijner kinderen. Als golven verhieven zich telkens weer opnieuw de jubelkreten der menigte, er kwam geen eind aan de geestdriftige huldiging, totdat de H. Vader een teeken gaf en allen zwijgend neerknielden en den apostolischen Zegen voor zich en de hunnen ontvingen. Aanstonds daarna hief, *volgens bijzondere toestemming verleend aan ons, Esperantisten*, het vatikaansch orkest ons lied „Ni volas Dion" aan, en wij zongen met dubbel krachtige stemmen fier en geestdriftig dat lied te midden van 3000 verscheidentalige pelgrims. Wat zaligheid in onze harten, vergeten was de lange vermoeiende reis, de drukkende hitte van Rome . alles veranderde in pure, heilige, echte vreugde, waarvan de geheugenis onze donkerste dagen in de toekomst zal verhelderen. Ten einde was ons lied, het orkest verstomde, opnieuw donderden de toejuichingen der menigte, en . daar ging Hij heen, die eerbiedwaardige Grijsaard met zijn in-gezond uiterlijk, zijn indrukwekkende houding, zijn goedheid en heiligheid ademend gelaat, ... daar verdween de blanke gestalte uit onze oogen, maar gegrift in onze herinnering voor eeuwig!

En ook wij gingen langzaam heen, elkaar ons geluk en onze vreugde vertellende. Toen ik Sro Colas zag omhelsde ik hem bijna: Was hij het niet die alles alleen bezorgd had? Ik herinner me niet juist weer, wat al dwaasheden we uit louter ethousiasme praatten, alleen weet ik nog, dat ik hem aanstonds wilde doen heiligverklaren, door uit te roepen: „Amiko Colas, gij kunt inderdaad wonderen doen!"

Het is ontwijfelbaar, dat wij door onze Esperanto-zangen tegelijkertijd een goede

inter la amaso en la Vatikano per nia kantado en Esperanto; la *Corriere d'Italia* enhavis detalan artikolon pri nia aŭdienco kaj kantado. Ankaŭ per niaj ekskursoj al preĝejoj kaj vidindaĵoj ni faris bonegan propagandon en Romo, ĉar ĉiuj niaj veturiloj estis ornamitaj per Esperantaj flagetoj. Ĉiu dumvoje rimarkis ilin kaj petis klarigojn.

Mi ankoraŭ menciu nian pian viziton al la Katakomboj, kie nia Prezidanto P-ro Parker diris la S. Meson, dum kiu ni kantis kaj komuniiĝis, kaj la Franciskana P-ro Modesto Carolfi O. F. M. predikis. Estis kortuŝa ceremonio en tiu loko, kie iam unuanime kunvenis la unuaj Kristanoj, kaj kie la martiroj ripozis en paco.

Je memoro de nia kara Prezidanto Richardson okazis solena funebra Meso kantita. Funebra prediko estis dirita de P-ro Bianchini. D-ro SMULDERS

(E.K. Okt.) Fragmento.

propaganda gemaakt hebben onder die massa in het vaticaan; de *Corriere 'd Italia* gaf een uitgebreid artikel over onze audientie en onze gezangen. Ook door onze bezoeken aan kerken en bezienswaardigheden maakten wij eene prachtige propaganda in Rome, wijl al onze rijtuigen met Esperanto-vlaggetjes getooid waren. Onderweg werden deze door iedereen opgemerkt en werden inlichtingen gevraagd.

Nog moet ik aanstippen ons vroom bezoek aan de *Katakomben*, waar onze prezident, p-ro Parker de H. Mis las, onder welke wij zongen en communiceerden en de Franciskaner pater *Modesto Carolfi O. F. M.* preekte. Dat was een aandoenlijke plechtigheid op die plaats, waar eens de eerste Christenen eensgezind vergaderden en waar de martelaren in vrede rusten.

Ter gedachtenis aan onzen beminden prezident p-ro Richardson had eene plechtige gezongen Uitvaart plaats. Door p-ro Bianchini werd eene rouwpredicatie gehouden.

Kelkaj Impresoj de la Naŭa Universala Esperanto-Kongreso en Bern

Ĉiu nova Esperanto-Kongreso fortikigas en la esperantistoj, kiuj apartenas al nia afero ne nur per sia kapo, sed ankaŭ per sia koro, la amon al la interna ideo de la esperantismo, kaj iom post iom la ĉiujaraj kongresoj fariĝos konstanta festo de la homaro kaj de homa frateco.

Ankaŭ en Bern vidiĝis penado al frateco, ne nur sur la podiumo (kie sub la aplaŭdo de la ĉeestantoj Franco prenis la manon de Germano dum la angla kolonelo Pollen rigardis kun radianta rideto) sed same inter la 1200 kongres-

Eenige Indrukken van het negende algemeene Esperanto-Congres te Bern.

Elk nieuw Esperanto-Congres versterkt bij de Esperantisten, die onze zaak niet alleen met 't hoofd maar ook met het hart dienen, de liefde tot de grondgedachte van 't Esperantisme, en langzamerhand zullen de Congressen een voordurend feest der menschheid worden, een feest der broederschap onder de menschen.

Ook te Bern was dit streven naar broederschap merkbaar, niet alleen op het podium (waar onder applaus der aanwezigen een Franschman met hartelijkheid de hand reikte aan een Duitscher, terwijl de Engelsche kolonel Pollen met stralenden glimlach toezag) maar niet

anoj. Oni ne aŭdis disonanton, ĉiam regis spirito de reciproka afablecc. Ĉiu kongresano sentis la devon postlasi bonan impreson de civilizeco kaj intelekto kaj tiel kunlaboi por la sukceso de la afero.

Dum sep tagoj oni vivis novan vivon ekster la ordinara sfero, vivon plena je freŝaj impresoj, novaj sentoj; oni koniĝis kun aliuloj, amikiĝis kun homoj el ĉiuj partoj de la mondo, oni interŝanĝis ideojn, opiniojn, sciigojn; oni sentis sin hejme inter la diversaj popoloj, ĉar oni uzis la saman lingvon, oni sentis sin kiel parto de unu granda tuteco, ekzistis diferencaj opinioj, religiaj aŭ sociaj, sed estis unu potenca bindilo: la komuna lingvo. En la bela urbo Bern kreskis la floro, kiu kreskas je ĉiuj kongresoj, floro de la sento de reciproka estimo kaj respekto por la sentoj kaj ideoj de aliuloj.

Tiuj estas miaj ĝeneralaj impresoj, permesu nun al mi skizi en malmultaj linioj bildon de la plej gravaj okazaĵoj de la „Naŭa".

La 23an de Aŭgusto, mi alvenis en la historie fama ĉefurbo de Svisujo en Bern, la pentrinda urbo, jam de Goethe [1779] priskribita kiel la plej bela urbo, kiun li ĉiam vidis.

Sed nur iom post iom mi ricevis la plenan impreson de la rava urbobildo, ne ankoraŭ la unuan tagon, kiam mi nur havis sufiĉan tempon por ripozi iom kaj poste iri en la Kazinon, kie mi konatiĝis kun diverslandaj samideanoj, kaj pasis en la bela ĝardeno tre agrablan vesperon.

La Dimanĉo komencis inde

minder onder de 1200 Congressisten. Geen dissonance werd er gehoord, overal heerschte een geest van onderlinge welwillendheid. Ieder Congressist voelde het als een plicht een goeden indruk van beschaving en intellekt achter te laten en daardoor het zijne bij te dragen voor het succes van het geheel.

Zeven dagen lang leefde men een nieuw leven, buiten de gewone sfeer, een leven, vol frissche indrukken, nieuwe gevoelens; men maakte kennis met anderen, sloot vriendschap met menschen uit alle deelen der wereld; men wisselde van gedachten en meeningen; men voelde zich tehuis onder de verschillende volkeren; want men gebruikte immers dezelfde taal als voertuig der gedachten; men voelde zich als deel van één groot geheel. Er bestonden verschillende meeningen op godsdienstig of sociaal gebied, doch één sterke band verbond allen: de gemeenschappelijke taal, In de schoone stad Bern bloeide opnieuw de bloem, die ontluikt op alle Esperantocongressen, de bloem der verdraagzaamheid, de bloem van wederzijdsche achting en eerbied voor ieders overtuiging.

Dit zijn m'n algemeene indrukken, veroorloof me nu, u in enkele lijnen een beeld te schetsen van het Negende Algemeene Esperantocongres te Bern.

Den 23sten Augustus kwam ik aan in de hoofdstad van Zwitserland, in Bern, de schilderachtige stad, die door Goethe (in 1779) geroemd werd als de schoonste stad, die hij ooit gezien had.

Doch slechts langzamerhand drong het besef van de schoonheid van dit verrukkelijke stadsgezicht tot me door, en zeker nog niet den eersten dag, toen ik na de aankomst nauwelijks den tijd had een weinig uit te rusten en me te verfrischen, want ik moest mij naar den Kasinotuin spoeden, waar kennis zou worden gemaakt met mede Esperantisten uit verschillende landen. Daar bracht ik in den mooien tuin een zeer aangenamen avond door.

De Zondag begon waardig met gods-

kun diversaj Diservoj. En la katolika preĝejo „Trinitatis" mi aŭdis belan predikon de S-ro Abato Raici el Buda Pest. Je la tria okazis la solena malfermo de la kongreso. Tiu-ĉi kunveno estis tre impona. Pli ol 1200 personoj aŭskultis en solena silento la paroladon de la eminentuloj de la kongreso. Nur la sciigo de la morto de S-ro Karlo Bourlet, unu el la ĉefoj de la Esperanto movado en Francujo, kaj de l'Abato Richardson, la afabla kaj aminda prezidanto de la katolika Esperantistaro malheligis la ĝojan feston. La ĉefaj paroladoj estis tiuj de la honora prezidanto S-ro Frey (eksprezidanto de la Svisa Respubliko), kiu parolis pri la toleremeco inter la popoloj, kaj la malferma parolado de S-ro de Saussure, kiu unue dankis la Majstron en la nomo de la tuta Esperantistaro por liaj multjaraj fidelaj zorgoj. Poste li anoncis ke la kongreso diskutus unu el la plej gravaj proponoj pri la organizo de I. A. E. (internacia asocio Esperantista) asocio de naciaj societoj, en kies nomo laborus poste la oficialaj institucioj.

Tre emociiga estis poste la solena prezentado al Dro. Zamenhof de memoriga medalo pri la unua 25 jara periodo. La „Majstro" dankis en kelkaj vortoj, sekvitaj de tondra aplaŭdo.

Fine venis la paroladoj de la naciaj delegitoj, kiuj preskaŭ ĉiuj parolis sprite kaj flue kaj estis multe aplaŭdataj.

Post fermo de la kunsido de S-ro Schmid, la prezidanto de la kongreso, la kongresanoj marŝadis malantaŭ siaj naciaj flagoj en solena procesio tra la ĉefaj stratoj de la urbo. La intereso de la Bernanoj estis granda, laŭlonge de la vojo staris densaj vicoj da rigardantoj. Poste mi

dienstoefeningen in de verschillende kerken. In de Katholieke Triniteitskerk hoorde ik een mooie predicatie van Abato Raici uit Buda-Pest. Om drie uur had de plechtige opening van het congres plaats. Deze vergadering was zeer indrukwekkend. Meer dan 1200 personen luisterden in eerbiedige stilte naar de woorden van de voormannen van het Congres. Slechts de mededeeling van den dood van den heer C. Bourlet, een der voormannen der beweging in Frankrijk en van Abbé Richardson, den welwillenden en beminnelijken president der Katholieke Esperantisten wierp een sombere schaduw over het blijde feest. De voornaamste toespraken waren die van dan eerepresident Frey (gewezen president der Zwitschersche Republiek,) die sprak over de verdraagzaamheid onder de volkeren en het openingswoord van René de Saussure, die in de eerste plaats den „Majstro" dankte namens alle Esperantisten voor zijn langjarige toewijding. Vervolgende kondigde hij aan, dat het Congres een besluit zou moeten nemen omtrent een zeer gewichtig voorstel over de organisatie van I. A. E., een vereeniging van nationale bonden, in wier naam voortaan de officieele instellingen zouden moeten werken.

Een ontroerend moment was daarna de plechtige aanbieding van een herinneringsmedaille aan Dr. Zamenhof. De „Majstro" dankte in eenige welgekozen bewoordingen, waarop een donderend applaus volgde.

Vervolgens kwamen de toespraken van de afgevaardigden der verschillende natiën aan de beurt, bijna allen spraken vloeiend en geestdriftig, zoodat ze zeer werden toegejuicht.

Na het sluiten der bijeenkomst door den heer Schmid, den president van het Congres, trokken de Congressisten, ieder achter zijn eigen nationale vlag in plechtigen optocht door de hoofdstraten der stad. De belangstelling der inwoners van Bern was zeer groot, langs den weg stonden dichte rijen van toeschouwers geschaard. Later vernam ik, dat deze

aŭdis, ke tiu-ĉi marsado estis efektiva propagandilo.

Vespere mi admiris la lumigon de la katedralo, kiu tre efike reliefigis la admirindan gotikan konstruaĵon.

Lundon komencis la laboro; ĉar oni ne estas en la mondo por mallabori kaj oni ne kongresas nur por amuzo. Jam je la oka kaj duono okazis ĉiutage fakkunsidoj en la Universitato. Dum la daŭro de la kongreso kunvenis tie: Ruĝkruculoj, kuracistoj, socialistoj, katolikoj, vegetaranoj, instruistoj, juristoj, publikoficistoj, inĝenieroj, arĥitekturistoj, studentoj, bontemplanoj, k. t. p. por priparoli siajn fakajn interesojn. Tiuj kunvenoj ne estis ĉiam tro bone vizitataj, precipe je la fino de la kongreso, sed la laboraj kunsidoj de la kongreso kaj de U. E. A. ĝuis ciam grandan intereson de la kongresanoj. Je la festa malferma kunsido de U.E.A. posttagmeze la salono estis plena kiel ankaŭ ĉe la aliaj ĝeneralaj, kunsidoj. Ne estas mirinda tio, ĉar oni havis la ŝanĉon aŭskulti la eminentulojn de la movado, bonajn, elokventajn parolantojn kun granda oratora talento. Tie, pli ol en la teatro oni povis admiri la belsonecon de nia kara lingvo same kiel la praktikan taŭgecon. Sed mi ne volas tedigi vin kun detala priskribo de la diversaj tagordoj; vi sufiĉe povas imagi tion, sen daŭrigo de mia seka raporto pri la labora de la laboremuloj; mi pli volonte rakontos iom pri la festvesperoj, kiuj estis kvazaŭ rekompenco de la laciga taga laboro.

El ili estis la teatra prezentado de „Patreco" kaj „Ginevra" gravaj okazaĵoj. La unua estis ludita de dilentantoj, tial la juĝo pri

optocht een zeer goede propaganda was geweest.

Des avonds bewonderde ik de verlichting van de kathedraal, waardoor de lijnen van den mooien gothischen toren bijzonder schoon uitkwamen.

Des Maandags begon de eigenlijke arbeid, want men is niet op de wereld om te luieren en men gaat niet enkel naar een Congres voor amusement. Reeds om halfnegen s'morgens vingen dagelijks de vakbijeenkomsten in het Universiteitsgebouw aan. In den loop der week kwamen daar samen: leden van 'tRoode Kruis, doktoren, socialisten, Katholieken, vegetariërs, onderwijzers, rechtsgeleerden, ingenieurs, architekten, Studenten, Goede Tempeliers e.a. om over hunne speciale belangen te spreken. Deze bijeenkomsten werden niet altijd bijzonder druk bezocht, vooral tegen het einde van het Congres, doch de arbeidszittingen van het Congres en van U. E. A. daarentegen mochten zich steeds in de belangstelling van bijna alle Congressisten verheugen. Bij de feestelijke openingsvergadering van U(niversala) E(speranto) A(socio) was de zaal geheel gevuld, wat eveneens het geval was bij de andere algemeene vergaderingen. Geen wonder ook, want men had het voorrecht de eminente voormannen der beweging te hooren, die vaak uitstekende sprekers waren met groote oratorische talenten, Hier, kon men (beter dan tijdens de tooneelvoorstelling) de welluidendheid van onze taal bewonderen en haar praktische bruikbaarheid toetsen. Doch ik wil U niet vermoeien met een gedetailleerde opsomming van al het werk, dat het dagelijksche programma aanbood, gij kunt U dat wel voorstellen, ook zonder dat ik een droog verslag over den arbeid der stoere werkers uitbreng; liever vertel ik U iets over de feestavonden, die ter belooning moesten dienen voor het vermoeiende dagwerk.

Een gewichtig feit was de voorstelling van de beide tooneelstukken „Patreco" en „Ginevra." Het eerste werd door dillettanten gespeeld, eenvoudige horloge-

ludo kaj elparolado devas esti milda, kaj mi devas uzi la konatan „mantelon de amo" por kovri la peketojn de la ludantoj. La dua „Ginevra", verkita de Edmond Privat laŭ la konata angla legendo de la reĝo Arturo kaj la kavaliroj de la Ronda Tablo, estis prezentita de la sama flandra aktoraro, kiu en Antverpeno ludis „Kaatje". Tio sufiĉas. Al la klera verkisto kaj la ludantoj mian honorsaluton!

Sed la „clou" de la festoj estis la ekskurso al la ĉarma Interlaken. Mi neniam vidis tiel ravan urbon, luksan, brilan kiel juvelon inter la belaj svisaj urboj. „Bela kiel revo" estis la aspekto de la majesta, belega monto Jungfraŭ en fundo starante kaj pli proksime oni ekvidis verdajn herbejojn, brunajn dometojn kun grandaj tegmentoj, bruantajn riverojn kaj akvofalojn, malhelajn arbarojn kaj sovaĝajn rokojn, kaj super ĉio la blindige blankajn montpintojn eterne kovritajn de glacio kaj neĝo kaj la sunan bluan ĉielon; certe... bela kiel revo!

Tiu tago estas neforgesebla, unue la vojaĝo, en gaja societo, parte fervoje, parte vaporŝipe, tra la montaro kaj la belega lago de Tun kun la grandiozaj Alpoj al la horizonto; poste la promenado tra la urbo, la tagmanĝo meze de ĝojaj ekskursistoj, la suprenirado per ŝnurfervojo sur la monton Harden; la mirinde belega vidaĵo tie sur la „Jungfraŭ", la vespermanĝo kun la „ruĝanta" montego antaŭ la okuloj, la koncerto en la „Kursaal", kaj „last but not least" la brilega fajraĵo, ĉio kune kun la belega vetero farigis tiun-ĉi tagon la brilpunkton de la festaj tagoj.

makers, daarom moet m'n oordeel over spel en uitspraak zacht zijn en past het mij gebruik te maken van den bekenden „mantel der liefde" om de zonden der spelers de bedekken. Het tweede „Ginevra," door Edmond Privat gedicht, bewerkt naar de Keltisch-Kimrische legende van koning Artur en de ridders van de Tafelronde, werd opgevoerd door dezelfde Vlaamsche tooneelspelers, die in Antwerpen met zooveel succes „Kaatje" speelden. Dat zegt genoeg. Aan den talentvollen schrijver en de executanten mijn eeresaluut!

Maar de „clou" van de feestelijkheden was het uitstapje naar het schoone Interlaken. Nooit zag ik zulk een verrukkelijk oord, zoo rijk, zoo schitterend als een juweel onder de mooie Zwitsersche steden. „Schoon als een droom" was de aanblik van den prachtvollen, majestueusen berg „de Jungfraŭ" zich op den achtergrond verheffende met op den voorgrond groene weiden, bruine huisjes met de groote daken, schuimende rivieren en watervallen, duistere wouden en wilde rotspartijen en boven dat alles de verblindend witte bergtoppen, bedekt met eeuwige sneeuw en de zonnige blauwe hemel; voorzeker... schoon als een droom!

Deze dag was onvergetelijk mooi! eerst de reis in vroolijk gezelschap, gedeeltelijk per trein, gedeeltelijk per stoomboot door het gebergte en over het prachtige meer van Tun met de grootsche Alpen aan den gezichteinder; vervolgende de wandeling door de stad, het middagmaal te midden van vroolijke menschen, de opstijging per tandradspoorweg naar den top van den berg Harden, het wonderbaar heerlijk uitzicht vandaar op den „Jungfraŭ," het souper, gekruid door lach en scherts met het gezicht op den reuzenberg, die wonderbaar gekleurd was door de stralen der ondergaande zon, nog later het concert in de „Kursaal" en „last but not least" het schitterend, zeldzaam mooi vuurwerk, dat alles in vereeniging met het prachtige zomerweer maakte dezen dag tot het glanspunt der feestdagen.

Interesa ankaŭ estis la venonta tago, kiam okazis la granda internacia balo, festo por oreloj kaj okuloj pro la bela muziko, kaj la naciaj kostumoj. La granda, ne ordinare belega salonego prezentis pentridan multkoloran aspekton de homoj kiuj amuzis sin mem kaj aliajn.

Sabaton matene okazis novaĵo en la historio de la kongresoj, nome la internacia oratora konkurso, al kiu ses sinjoroj kaj du sinjorinoj partoprenis. S-ro Pichon el Francujo kun la temo „Patrujo", akiris la unuan premion, Germana Sinjoro la duan, kaj Hungaro la trian. Entute estis la konkurso interesa kaj utila, interesa, ĉar diversnaciaj geesperantistoj partoprenis, utila, tial ke rezultas el ĝi por la aŭdantaro instruo, nome ke ni ĉiuj devas pli zorge atenti pri ĝusta elparolado de nia lingvo.

La tago finis kun muzika kaj literatura vespero kun impona orgenludo kaj belega parolado de S-ro Privat, „la majstro de l'esperanta parolo."

Dimanĉon matene okazis la ferma kunsido de la kongreso dum kiu S-ino Haenkel disdonis la premiojn de la oratora konkurso kun kelkaj afablaj vortoj. Poste sekvis la kutimaj paroladoj de la estraro kun dankvortoj al ĉiuj kaj fine donis S-ro Privat kelkajn praktikajn konsilojn pri la elparolado, kiuj precipe por ni Nederlandanoj estas tre gravaj, ĉar niaj lernolibroj ĉiam diras al ni, ke la elparolado de la vokaloj estas *longa*. Tio ja estas granda eraro, S-ro Privat certigas, ke la vokaloj estas mallonge elparolataj, ekzemple li diris:

Oni ne devas diri *jees*, sed *jes*,

Interessant was ook de volgende dag, toen het groote internationale bal plaats vond, dat een feest was voor de ooren en voor de oogen, wegens de mooie muziek en de fraaie kostuums. De groote, zeldzaam mooie zaal bood een schilderachtig schouwspel aan van menschen, die zich zelf en anderen amuseerden.

Zaterdags gebeurde er iets nieuws in de geschiedenis der Congressen, er had n.l. een wedstrijd in 't houden van redevoeringen plaats, waarvan zes heeren en twee dames deelnamen. De heer Pichon uit Frankrijk, die over „het Vaderland" sprak, bepaalde den eersten prijs, een Duitscher den tweeden en een Hongaar den derden. Over 't geheel was deze wedstrijd interessant en nuttig, interessant omdat Esperantisten van verschillenden landaard eraan deelnamen en nuttig, omdat de toehoorders er de les uit konden trekken, dat wij allen beter op de uitspraak van Esperanto moeten letten.

De dag werd besloten met een muzikale en litteraire avond, waar men o.a. prachtig orgelspel, en geestige voordrachten te hooren kreeg en bovenal genoot van een prachtige redevoering van den Heer Privat, „den meester van het Esperantowoord"

Zondags 's morgens had de slotvergadering van het Congres plaats, waarbij S-ino Haenkel de prijzen van den oratorischen wedstrijd met eenige vriendelijke woorden aan de prijswinners uitreikte. Daarna volgden de gebruikelijke toespraken van het bestuur met dankwoorden aan allen, terwijl tot slot de heer Privat, op verzoek, eenige zeer praktische mededeelingen deed over de uitspraak van 't Esperanto, die vooral voor ons Nederlanders van groot belang zijn, omdat in onze leerboeken staat, dat de klinkers alle *lang* worden uitgesproken. Dit nu is een groote dwaling. Edmond Privat verzekert, dat de klinkers *kort* moeten worden uitgesproken, hij zeide bijvoorbeeld:

Men mag niet zeggen *jees*, maar *jes*

ne *eestas*, sed *estas*, k.t.p. Ankaŭ li parolis pri la akcento, kiun multaj Francoj, nome la ludantoj de „Patreco", alportis sur la lastan silabon. Sed tio estas eraro, kiun ni Nederlandanoj ne faras.

Post la paroladoj de kelkaj rajtigitaj delegitoj inter kiuj estis ankaŭ nia samlandano S-ro Vermaas el Rotterdam, kiu tre bone kaj sprite parolis, la orgeno ludis la himnon de la Esperantistaro kaj la multaj ĉeestantoj disiĝis kun la reciproka saluto „Ĝis la revido en Parizo!"

Posttagmeze estis ankoraŭ granda festo sur la monto Gurten, sed multaj kongresanoj ne povis ĉeesti, ĉar por ili la horo de foriro sonoris.

Nur kun bedaŭro ili foriris el la ĉarma urbo, kie ili pasis tiel agrablajn horojn, kie ili trovis nutraĵon por spirito kaj animo, kie ili lernis, ke la ideo de frateco kaj unueco inter la homoj ne pli longe estas utopio.

Kaj tre multaj el ili, kiel mi, revenis hejmen kun la firma intenco estonte fervore labori por la disvastiĝo de nia kara lingvo Esperanto.

Fine restas ankoraŭ al mi la agrabla tasko danke rememori la afablecon de niaj gesamidenoj el Mülhausen en Elsaso, kie mi kun du aliaj samideanoj pasigis agrablegen vesperon en gaja familia rondo. En gastemeco kaj afableco ili montris sin veraj gefratoj, membroj de unu granda familio.

Mi finas mian raporton kun la vortoj de Lessing (kiuj povas esti mia senkulpigo, se ĝi estis tro longa kaj seka):

„Ich hoffe. dass hierdurch an Manchen Mann wird kommen,
Manches, wovon er sonst gar hätte nichts vernommen!"

H. v. GRIENSVEN,
's-Hertogenbosch, en Sept. 1913a

niet *eestas*, sed *estas* enz. Ook keurde hij het zeer af, dat vele Franschen (ook de spelers van „Patreco") op de laatste lettergreep den klemtoon leggen, Doch dit is een fout, waaraan wij Nederlanders ons niet schuldig maken.

Na korte toespraken van eenige afgevaardigden, waaronder ook onze landgenoot, de heer Vermaas uit Rotterdam behoorde, die zeer goed en geestig sprak, speelde het orgel de hymne der Esperantisten en gingen de talrijke aanwezigen slechts noode uiteen met den wederkeerigen groet: Tot weerziens in Parijs!"

Des middags was er nog een groot volksfeest op den berg Gurten, waaraan vele congressisten niet konden deelnemen daar voor hen het uur van vertrek sloeg.

Met leedwezen verlieten zij de mooie stad, waar zij zooveel aangename uren doorgebracht hadden, waar zij voedsel vonden voor geest en gemoed, waar zij leerden, dat de idee van broederschap en eenheid onder de menschen geen utopie meer is.

En zeer velen van hen, evenals ik, keerden hniswaarts met het heilige voornemen in de toekomst met alle kracht te werken aan de verbreiding van onze geliefde taal Esperanto.

Tot slot blijft me nog de aangename taak vol dankbaarheid hier de vriendelijkheid van onze mede Esperantisten uit Mülhausen in den Elsas te gedenken, waar ik met twee andere „samideanoj" een zeer aangenamen avond doorbracht in een gezelligen familiekring. Door hunne gastvrijheid en vriendelijkheid toonden zij zich inderdaad als broeders en zuster, als leden van éene groote familie.

Ik eindig dit verslag met de woorden van den dichter Lessing, (die mogelijk mijne verontschuldiging kunnen zijn, indien ik te langdradig en vervelend was):

„Ik hoop, dat hierdoor aan menig mensch zal komen. Veel waarvan hij anders wel nooit iets had vernomen."

OFICIALA PARTO.

Ŝanĝoj en la anara listo ĝis la 15a de Septembro 1913a.

FAVORANTOJ.

Adresŝanĝo:

S-ro H. J. D. van Oort, Dokkum al Wolvega, Kerkbouw.

UNUIĜOJ.

Amsterdam „Nia Kredo"

Novaj membroj:

S-ro L. G. Hermans, J. v. Lennepkade 171 III.

S-ro A. W. H. Hafkamp, Singel 414.

PETO!! Ni petas insiste al la Sekretarioj (inoj) de la unuiĝoj, ĉiam sendi la ŝanĝojn en la anara listo ĉiumonate antaŭ la 15-a al la ĉefsekretario de Nederlanda katoliko, S-ro H. B. van Zwet, Leeuwstraat 3bis Utrecht.

Saman peton al la favorantoj pri adresŝanĝoj.

Plendojn, pri la neregula ricevo de nia organo „Nederlanda Katoliko" al la sama adreso.

Regularo pri la Legrondoj.

Art 1a.

La R.K. Ligo „Nederlanda Katoliko" donas al siaj membroj la okazon kune legi ian periodikon aŭ libron per legrondoj.

Art. 2a.

La kontrolado de la legrondoj apartenas al la komisio por „Literaturo kaj Studado", dum la administrado estas komisiita al administranto, nomita de la tagestraro.

Art. 3a.

La religia konsilanto de N. K. decidos pri jes - aŭ ne - akcepto de periodiko aŭ libro en la legrondojn.

Art. 4a.

La administranto decidas, ĉu iu legaĵo havas sufiĉi da partroprenantoj por ĝin cirkuligi, kaj zorgos pri plej regula kaj facila sendado kaj cirkulado.

Art. 5a,

La komisio por L. kaj S. publikigos liston da periodikoj kaj libroj, aprobitaj de la religia konsilanto, al kiuj la membroj povas aboni kiel kunlegantoj. Membroj, kiuj deziras legi ian libron aŭ gazeton ne cititan, povas sin direkti por akceptpeto al la komisio aŭ la administranto, kiuj post aprobo de la religia konsilanto, povas ebligi la aĉeton aŭ abonon.

Art. 6a.

Por certigi la ĝustatempan forsendadon de iu leĝajo, la administranto rajtas monpuni tiun kiu per prokrasto de la forsendo malreguligas la cirkuladon. Tiu monpuno estos 10 cendoj. Kiam iu je la sesa fojo dum jaro estas monpunita, la komisio povas dum iom da tempo senrajtigi lin partopreni al la legrondoj.

Art. 7a.

„Nederlanda Katoliko" pagos kvinonon de la abon- aŭ aĉetprezo kaj plue la kostojn pro administrado. La periodikoj kaj libroj legitaj estos propraĵo de N.K. Difektigo aŭ perdo de iu numero aŭ verko devas esti kompensata de la kulpulo. La komisio fiksos la kiomecon de la domaĝo.

Art. 8a.

La partoprenantoj mem pagas la re- aŭ trasendon kaj zorgos pri taŭga enpakado.

Art. 9a.

La komisio fiksas la legprezon de ĉiu legaĵo konforme al la nombro de la kunlegantoj kaj la enhavo de art. 7a. Tiu legprezo estas antaŭpagota.

Art. 10a.

La administranto rajtas cirkuligi periodikon aŭ libron je pluraj ekzempleroj, se laŭ lia opinio la partoprenado estas sufiĉe multnombra por ebligi disigon en la cirkulado.

Art. 11a.

Okaze de diverseco en la opinioj inter la komisio aŭ administranto kaj la kunlegantoj, la tagestraro de N.K. decidos.

Art. 12a.

Legitajn jarkolektojn kaj librojn la tagestraro de N.K. povas publike vendi dum la jurkunveno.

Art. 13a.

Ĉiujare antaŭ la jarkunveno la administranto sendos sian jarkonton al la komisio por L. kaj S., kiu post aprobo ĝin sendos al la tagestraro.

Art. 14a.

Ŝanĝojn en tiu-ĉi regularo nur povas fari la tagestraro, aŭdinte la komision. Ankaŭ tiu-ĉi rajtas fari ŝanĝproponojn.

Aprobita Sept. '13.

L. J. J. M. POELL, R.K.Pr.
Prez. N.K.

H. B. VAN ZWET,
1e Secr. N.K.

ENLANDA KRONIKO.

Tilburg. La Tiburgaj gesamideanoj kunvenis la 23an de Septembro, por priparoli gravan aferon, sed antaŭe ili estis devigataj aŭskulti malbonan raporton pri la vojaĝo de unu el la membroj. Tiu membro estis bonvolema sed la tempo mankis por prepari bonan legadon, se tia almenaŭ estus ebla al tiu membro. Do, la pritraktita afero estas jena: komencos nova esperanto-kurso por laboristoj. La religiaj fratoj volonte donos ĉi tiun kurson, sed ili preferis ke oni komencos per nederlandlingvo-kurso por ke poste ili pli bone povus doni esperantokurson. La kunveno akceptis ĉi-tiun proponon, kaj petis al 2 el niaj anoj prizorgi ĉion rilate la kurson. La samaj personoj klopodos fondigi novan unuiĝon de esperantistaj laboristoj kiel filunuiĝon de nia grupo. Plie oni decidis ke ni denove devas propogandi nian lingvon dum la venonta vintro per ĉiuj permesitaj rimedoj. Kiel en lasta vintro ankaŭ nun okazos konversaciaj vesperoj dusemajne, je la sama horo kaj je la sama tago kiel lastan jaron, komencante la 25an de Septembro. Je la fino ni havis plezuron aŭdi leteron de nia gaja samideano Nivard el Groningen; koran dankon al li. La kunveno estis fermata kantante la himnon „Tagiĝo".

Franc. v. Amelsfort.

Ĉu la raportistino ne skribas iom tro modesta pri si mem?

Red.

KRONIKO DE I.K.U.E.

LA ORFIĜINTA I.K.U.E.

I.K.U.E. perdis sian kreinton kaj patron, sian gloron kaj forton, sian ĉarmon kaj allogon. I.K.U.E. nun similas al ne-plenkreskulo, kiu pos la subita perdo de siaj gepatroj estas devigita, sen ilia plua apogo kaj

konsilo, trovi mem sian vivvojon, gajni mem sian propran panon.

Kiom zorgema ofte estis la bedaŭrata patro pri sia kara I.K.U.E. Li sciis kaj plendis ofte, ke al li mankis la fortojn por kunduki ĝin en la vojon de ordo kaj prospero, de kiu ĝi foreraris pro juneca vagemo. Ho jes, la juna I.K.U.E. estis tiel bonkora, tiel bonsenta, tiel multe promesanta por la estonto; pro amo al sia maljuna patro ĝi detenis sin de malbonaĵoj, sed lia troa boneco kaj modesteco precize estas la kaŭzo, pro kio ĝi ne ankoraŭ eniris en la de li montritan vojon: la troa boneco de lia koro evitis tro laŭtan voĉon, tro severan admonon, tro insistan peton; la troa modesteco de lia animo malpermesis al li altrudi sian opinion kaj deziron. Kaj la gajuleto I.K.U.E. iris libere sian vojon, nur klopodante por ne kaŭzi intence al li malagrablaĵojn, kaj de tempo al tempo ĝojigante lian koron per bona konduto kaj bona faraĵo.

Sed nun subite lasita al si mem, ĝi sentas memriproĉojn, ĝi sentas bedaŭrojn pro tio, ke ĝi ne uzis la tempon dum la vivo de patro, por instruigi sin pri serioza laboro kaj memstareco.

Sed ni lasu la metaforojn kaj ni reiru al la realeco. Ĉu ni daŭrigos nian nunan agmanieron, nun, kiam, post foriro de nia prezidanto, ni mem devas daŭrigi lian laboron kaj certigi daŭran kaj ordigitan ekzistadon al lia I.K.U.E. ?

Kaj mi — mi serioze pripensadis, kion fari. Kion diri en la E. K.-numero, elironta post lia morto ? Mi severe demandis min, ĉu ni devas silenti, kiel ĝis nun, pri la mankoj kaj malordoj kaj senfruktecoj de nia I.K.U.E. Post longa pripenso, mi diris al mi mem : NE ! Ĉu la malkontenteco, kiu regas inter ni pro la malbona situacio de nia I.K.U.E., povas esti sufokita? Neeble! Oni silentis pro respekto kaj amo al la kara mortinto, oni ne volis malĝojigi liajn lastajn tagojn. Kaj pro tio oni silentis; ho vel per tio oni mortiĝis por I.K.U.E. Oni ankaŭ ne plu kunlaboris, donante siajn laborojn al aliaj aferoj. Kaj precize la pioniroj, la gravaj personoj, la influaj pastroj kaj laikoj, ne trovante seriozan laboron kaj fruktodonajn agadojn ĉe I.K.U.E., lasis ĝin al ĝi mem, kiel plenkreskuloj lasas la ludojn al la junuloj.

Ne estas eble, ne priparoli nian nunan danĝeran situacion. Kaj eĉ, se sukcesus silenti kaj silentigi kelkan tempon, iun tagon la per elektro ŝarĝita aero devas sin deŝarĝi kaj la fulmotondro eble okazos antaŭ aŭ dum „Nia Kvina", kiu precize devas esti la loko, el kiu nia I.K.U.E. devas eliri renovigita kaj revivigita; sed pro tio estas necese, ke tiam la vetero estu serena kaj bela kaj ke ni antaŭe prilabori la kampon kaj semu, por rikolti la fruktojn dum „Nia Kvina."

Kiam ni nur bone prezentas al ni la ideojn kaj dezirojn de P-ro Richardson, kiujn ni trovas en liaj verkoj kaj leteroj; liajn idealojn kaj atendojn, pri kiuj li tiel elokvente paroladis; kiam ni nur ne forgesu, spite de niaj interdiskutoj, lian amon por frateco kaj konkordo; kiam ni, kiel li, nur intencas la bonsukceson de nia sankta afero; kiam ni, kiel li, neniam altrudas niajn ideojn al aliaj, sed, post serioza interŝanĝo de ideoj, submetas nin al ordo kaj disciplino: al la deziro de la plimulto — tiam ni donos nian Richardson al I.K.U.E. post kiam ĝi lin perdis; tiam li vivos en ĝi, post kiam li mortis.

Mi nun petas ĉiujn, precipe la influajn kaj gravajn personojn, kiuj iam kunbaboris kun ni, sed kiuj nin lasis al ni mem kaj tute silentis de post pli mallonga aŭ pli longa tempo — ĉiujn mi petas, ke ili denove bonvolu kunlabori. *E.K. estas malfermita al ĉiuj kaj tute sanpartie donos lokon*

al ĉiuj opinioj. Kiu havas plendojn, kiu volas kritiki - por konstrui, ne por malkonstrui - li parolu, li estas bonvena. Sed neniu, kiu estas malkontenta pri I.K.U.E., silentu nun, por postuli la parolon poste, kiam E.K. jam estos ferminta siajn paĝojn por tio, post kiam ĝi donis al ĉiuj la okazon por eldiri ĉion, kio pezas sur la koro.

Mallonge jen mia opinio: Estas necese, ke la organizo kaj preparo de „Nia Kvina" en Lourdes komencu tuj per starigo de agema *loka organiza komitato* kaj de sperta kaj laborema *kongreskomitato.* Dum „Nia Kvina" la reorganizado de nia movado devas esti decidita precizmaniere en formo de definitiva *regularo de I.K.U.E.*, kiu estas necesega: tiu afero devas esti preparita kaj diskutita tute *antaŭ* la kongreso. Kaj, ĉar la nuna ĉefestraro de I.K.U.E. estas elektita nur por unu jaro, oni devas bone pripensi la plej bonan solvon de *elekto de definitiva Estraro.*

Jen, grava laboro nin atendas. De „Nia Kvina" dependos, ĉu I.K.U.E. perdiĝos en supraĵa kaj senvalora movado, aŭ ĉu ĝi ekstariĝos kiel komenco de serioza kaj praktika organizaĵo de agemaj Katolikoj de la tuta mondo; organizaĵo, kiu efektive servas la interesojn de la Katolikismo.

D-ro SMULDERS.

(Espero Katolika. Oktobro.)

Nia Gazeto „Espero Katolika".

Dekjara Ekzistado.

En Oktobro 1903 eliris la unua numero de nia kara revuo. Tiun ĉi monaton do E.K. ekzistas 10 jarojn. Mi intencis eldoni festnumeron por pli solene rememorigi tiun gravan daton por nia movado, sed pro tro malmulte da kunlaboro (kompreneble P-ro Richardson tuj promesis gravan artikolon) mi formetis la ideon (vidu E.K. Aprilo 1913, p. 127 kaj Majo 1913 p. 159).

Ni renovigu nian dankon al la fondinto de E.K., la simpatia P-ro Em. Peltier, kaj ni memoru lin en niaj preĝoj kune kun P-ro Richardson; iliaj meritoj por E.K. estas netakseblaj. Al ambaŭ noblaj pastroj ni dankas tian E.K., kia ĝi estis en la unuaj dek jaroj de ĝia ekzistado.

Ni nun havas gravan devon, ne nur por ebligi la daŭran vivadon de nia gazeto, sed ankaŭ por plibonigi kaj pligrandigi ĝin. Okaze de la dekjara ekzistado de E.K. mi insiste petas niajn amikojn, ke, por honori la memorojn de tiuj du grandaj pioniroj, ĉiu el ili, ankoraŭ tiun ĉi monaton, klopodu varbi almenaŭ unu, se eble kelkajn abonantojn. Tio estu ĉies festdonaco al ilia komuna gazeto, festdonaco, per kiu ili samtempe servos sian propran intereson: ĉar per pli granda nombro da abonantoj E. K. povos pliboniĝi kaj pligrandiĝi.

* * *

Ĉu tiuĉirilate oni sufiĉe faris la lastajn jarojn? Mi ne hezitas respondi: ne! Oni forgesas konigi la ekzistadon de nia gazeto; pro tio novaj abonantoj ofte skribis al la redakcio; „mi antaŭe ne sciis, ke ekzistas katolika Esperanta gazeto: eksciinte, mi tuj abonas". Eĉ dum niaj lastaj kongresoj iu abonantino renkontis fervoran katolikan samideanon, *kiu estas* **prezidanto** *de katolika nacia ligo esperantista* ĵus fondita, sed kiu tute ne sciis, ke ekzistas dekjara katolika gazeto Esperantista!

Jen fakto miregiga, nekredebla, sed kiu pruvas, ke estas nia devo, ĉie kaj ĉiuokaze propagandi kaj konigi nian karan revuon E.K.

* * *

Dum mia redaktoreco mi spertis la veron de la proverbo : kiom da kapoj, tiom da ĉapoj. Efektive la plej diversajn rimarkojn mi ricevis pri nia organo. Ili estas ofte tute kontraŭaj unu al alia.

Mi tamen povis konstati, ke la plimulto tre ŝatas la nunan enhavon de E.K. Oni milfoje esprimis sian ĝojon pri tio, ke E.K. fariĝis pli serioza kaj pli grava gazeto, kaj oni aldonis : „daŭrigu ! daŭrigu !" Efektive, kiam oni komparas la enhavon de la lastaj du jaraj kun tiu de antaŭaj, tiam neniu senpartia samideano povas nei la plibonigon. — Ankaŭ E. K. aperis regulo ĉiumonate dum la lastaj du jaroj — io, kio ĝis tiam nenian okazis, ĉar ĉiu scias, ke ĝi antaŭe kutimis eliri tute neregule, tiel neregule, ke ĉiu pro tio estis malkontentega.

Mi dum la Roma kongreso afable petis, ke oni faru kritikojn kaj rimarkojn pri nia organo, promesante artikolon en E. K., por respondi al ĉiuj. Tiu artikolo, kiu plej detale priparolos la interesojn de E.K. aperos en proksimaj numeroj de E. K.

D-ro Sm.

Algemeene Boekhandel „Espero"

Prinsestraat 48. -:- 's Gravenhage.

TELEFOON No. 2253.

Wat moet iedere groep, iedere propagandist, ieder meelevend Esperantist beslist hebben ?

Het juist uitgekomen

Tutmonda Jarlibro Esperantista

1913—1914.

Een rijk gedocumenteerd boek. Prijs f 1.90 vrachtvrij.

Zooeven verschenen: 3e veel vermeerderde uitgave v.d. Esperanto-Katologus, wordt aan alle groepssecretarissen toegezonden en overigens aan ALLEN die er om vragen.

NIET BEKOCHT !

„Nederlanda Katoliko" schreef o.a. over **het Leerboek in het Esperanto van Majoor J. P. L. NIESTEN**: „Zeker, de bedoeling is goed, men wil de boekjes niet te duur maken. Maar als zij dan in 't gebruik tegenvallen, is de lezer nog bekocht. Daarom is het zoo toe te juichen, dat iemand het aangedurfd heeft, een leerboek te schrijven, dat den respectabelen omvang heeft van 270 blz.. 'n leerboek met 'n schat van voorbeelden en oefeningsmateriaal, 'n leerboek dat langzaam, langzaam aan vooruitgaat, doch den gebruiker dan ook veilig en zeker zal brengen tot kennis der wereldtaal...."

De prijs van dit boek is f 1.50.

Esperanto Moerkerk Zegels.

Dit zegel is het meest artistieke onder de vele soorten Esperanto-Sluitzegels die bestaan.

Verkrijgbaar in den Boekhandel

en bij H. DAMEN St. Crispijnstr. 57, 'sBosch.

TOEZENDING FRANCO.

100 ex. f 0.15. 1000 ex. f 1.20
500 ex. f 0.65. 10,000 ex. f 8.—

VEREENIGINGEN GENIETEN KORTING.

ESPERO KATOLIKA.

Internacia monata gazeto.

Honorita per Apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Junio 1906.

Oficiala Organo de Internacia Katolika Unuiĝo Esp. (I.K.U.E.)

Redaktoro: D-RO SMULDERS.

Administranto: S-ro F. SLEIJFFERS, Prins Hendrikstr. 93, Den Haag.

Machinale Fabriek van Houtbewerking
„DE MARK".

Jac. van Groenendael, Breda

Alle Timmerwerken, Speciaal in Eikenhout

KERKBANKEN - KERKSTOELEN
SCHOOLMEUBELS, enz.

Stoomdrukkerij P. J. STRIJBOS HUIJBERS, Eindhoven.